


Pri la magazino Monato

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-851/345, 1980 januaro 31, februaro 02
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-52/SRI-1980-52-B-6-345-851-1980-01-31-02-02-Claude-kaj-Andree-Gacond-Pri-la-magazino-Monato.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La jaro 1980-a videble komenciĝas per okazaĵo signifoplena por Esperanto. Sub la titolo "Monato" ekaperas internacia magazino sendependa, kiu proponas pli ol distrajn artikolojn. Ankaŭ bone konstruitaj raportoj pri politika aktualeco altiras nian atenton kaj instigas al abonigo.



A.- Kiel vi verŝajne jam scias, antaŭ unu jaro Stefan Maul jam provis lanĉi samstilan magazinon, kies titolo "Semajno" videble pruvis, ke ĝi intencis esti ofta vizitanto. Kiel oni povis antaŭvidi, mankis al semajna magazino esperantlingva la necesa abonantaro, sed la reago de la publiko estis tamen tre kuraĝiga. Ni opinias, ke por monata magazino la abonantaro verŝajne ekzistos, des pli ke enhave "Monato" ne estas nura imitaĵo de samstilaj nacilingvaj periodaĵoj kaj ke en esperanto ĝi alportas originalan kontribuon ĝis nun mankantan.

Cl.- La unua numero de MONATO proponas plurajn ĉefartikolojn pri la politika vivo, kiujn ni legis kun granda intereso. Enkonduke la rubriko "Leteroj al Monato" pravas, ke la magazino pretas publikigi reagojn de legantoj. Tiuj leteroj, pri kies enhavo respondecas la aŭtoroj mem, instigos novajn legantojn siavice esprimi sian vidpunkton aŭ alporti reĝustigojn. Tiel ni havos vivoplenan forumeton.

A.- "Religio kun aŭ kontraŭ politiko" estas kvinpaĝa kompilaĵo, kiun Stefan Maul faris el tekstoj ricevitaĵoj de Earl Bills, Renato Corsetti, Philippe Cousson, Roberto Giuliani, Tomasz Jan Kudrewicz, Eléus Leonardo de Sà, Henrik Maŝler kaj Claude Piron. Alia grava artikolo preskaŭ kvarpaĝa, subskribita de Eŭgeno de Zilah, raportas pri la lando Afganio promesante sekvon al la proponita analizo.

Cl.- La rubriko "Serio de 1' Monato" publikigante travivaĵojn de Edward Symoens en Belga Kongo kaj nuna Zairo vipis nian abonemon. Symoens atentigas nin, ke "estas grava eraro prijuĝi pasintan epokon per hodiaŭaj kriterioj kaj valorskaloj" kaj li klopodas rekonstrui tra siaj propraj vivo, laboro kaj sperto la politikan, socian, ekonomian kaj precipe psikologian evoluon de koloniaj institucioj, strukturoj kaj pensmanieroj al sendependeco de Zairo. Ni ne dubas, ke multaj legantoj senpacience atentos la venontajn numerojn de "Monato" por daŭrigi la legadon de tiu interesa raporto.

A.- Ni ŝatis trovi dufoje mencion pri la ĵurnalista kontribuo de Teo Jung, kiu antaŭ ekzakte sesdek jaroj lanĉis la sendependan esperanto-gazeton "Esperanto triumfonta", kiu fariĝis en 1925 la semajna "Heroldo de Esperanto". Bernard Golden recenzas la ĵus aperintan libron Ĉiu-ĉiun, aŭtobiografion de Teo Jung kaj en siaj enkondukaj vortoj Stefan Maul montras, kio distingas la magazinon "Monato" de la organo "Heroldo de Esperanto". Ni citu lin:

Cl.- "La gazeto fondita de Teo Jung ankaŭ hodiaŭ havas en sia titolo la vorton Esperanto. Ĝin vi trovos en ĉi tiu magazino nur tre malofte. Malgraŭ tio ja estas fakto ke "Monato" aperas ekskluzive en Esperanto, kun artikoloj kaj kontribuajtoj verkitaj originale en la internacia lingvo. Aliflanke tio signalas, kian karakteron havas "Monato". Simple dirite, ĝi estas tute ordinara magazino, kiu turnas sin al legantoj de ĉiuj landoj, ĉiuj medioj kaj ĉiuj aĝoj...En tio ĝi do similas al multaj nacilingvaj magazinoj... Karakterizo de "Monato" estas ke raportas, informas kaj kontribuas en ĝi aŭtoroj el la koncernaj landoj, do indiĝenoj, ne iuj tien senditaj fremdlandaj ĵurnalistoj. En tio "Monato" funde diferencas de kaj antaŭas al siaj grandaj nacilingvaj fratoj. Krome ni ne forgesu ke tiaj magazinoj aperas nur en kelkaj "grandaj" naciaj lingvoj, dum "Monato" estas legebla ankaŭ en "malgrandaj" nacioj..."

A.- Stefan Maul do bone distingas unuflanke inter primovada organo kiel "Heroldo de Esperanto" kaj magazino en esperanto kiel "Monato". Aliflanke li provas diferencigi sian magazinon, kiu havas internacian karakteron, de la nacilingvaj. Estas fakto, ke tiurilate "Monato" povos ludi tute originalan rolon. Povu Stefan Maul sukcesi en sia entrepreno.

Cl.- Nia ĝisnuna recenzo donis al vi eble falsan bildon de la magazino "Monato". Vi eble kredas, ke temas antaŭ ĉio pri serioza revuo. Tute ne estas tiel. En la grizpaga centro troviĝas novelo de Bernard Grolden, Ŝaradoj, krucenigmoj, paĝo de la junularo, kaj iom ĉie noticoj kaj ŝercoj havas ripozigan efikon. Se ni ĉefe raportis pri la idea parto, tio estas, ĉar ĝi estas la plej signifa kaj originala. Ĝuste de la reago al ĝi de la legantaro dependos la sukceso mem de la magazino. Ĉu tiu legantaro kapablos akcepti sciigojn, kiuj ne necese kongruas kun la nacilingve ricevita informoj. Eĉ en esperantio multaj estas kvazaŭ hermete fermitaj al ĉio ne centprocente konforma al la persona idearo. La unua kontakto, kiun ni havis kun "Monato" pruvis, ke vere ĝi estas internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo. Povu ĝi flegi tiun ĉi sendependecon kaj la esperantisto ĝin akcepti, eĉ se ili apartenas al lando aŭ partio, kie tia sendependeco ne estas kutimaĵo.

A.- En la esperanto-vivo mem, la ekapero de "Monato" tutcerte ne estos seninflua. Sifiĉas kompari la proponitan magazinon kun la plimulto de la hodiaŭ aboneblaj revuoj, por tuj konstati, ke novan dimension la periodaĵo de Stefan Maul alportas. Se ĝi sukcesos varbi sufiĉan abonantaron, ĝi devigos la aliajn revuojn reekzameni la propran signifon. Tiu ĉi konkuro inter magazino en esperanto kaj organoj de esperanto-orgsnizaĵoj nur povos signifi progreson, eĉ se senenhavaj ĵurnaletoj devos malaperi. Povu havi la magazino "Monato" longan vivon, kaj okaze de kreskanta sukceso, la fakto mem, ke la lanĉa numero estis titolita "Semajno", instigos al la plioftigo de la eldonado.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond salutis la ekaperon de la magazino 'Monato'. Ĝis reaŭdo!